

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Informoj pri Brno - Legendoj

Kiel viandisto mortigis drakon

Miroslav Hruška

Foje alkuris al foiro de Brno virino el Líšeň kaj ke laŭdire trans la vilaĝo sur la monteto al Slatina kuŝas terurega besto, certe drako. Ŝi vidis ĝin efektive.

Homoj en la foiro ridis kaj mokis ŝin: „Ŝi certe estas frenezulino. Verŝajne ŝi vidis leporon.“

Sed la drako voris bovidon ĉe Slatina kaj poste iris informoj, kie ĝi aperis kaj kion ĝi faris.

Viroj el Líšeň diris, ke ili iros mortigi ĝin. En la vilaĝo ili havis ankoraŭ kuraĝon, sed tuj kiam ili estis sur kampoj, la kuraĝon ili perdis.

Regis timego. La homoj ne iradis al la foirejo.

Iun tagon venis viandista metihelpanto, haltis en gastejo kaj demandis la gastejestron:

„Pri kio bela oni parolas ĉi tie?“

„Pri nenio bela, sed pri sufiĉe da malbelaj aferoj,“ respondis la gastejestro kaj lamentis pri la drako.

„Se vi volas, mi mortigos la drakon. Sed mi bezonas freŝan haŭton el bovo.“

La homoj opiniis, ke li estas tro aŭdaca, ja ankaŭ la soldatoj forkuris.

Tamen ili donis al li la bovan haŭton, kiel li postulis. Li parolis plu:

„Donu al mi ankoraŭ sakon da kalko.“

Ili donis al li la kalkon kaj atendis, kio okazos.

La viandisto enkudris la kalkon en la bovan haŭton, metis sur veturilon kaj vip! veturis sur la monteton de Slatina. Tie li lasis la felan sakon sur la tero, la ĉevalojn kaŝis en arbaro kaj li mem grimpis sur pinon.

Post unu horo la drako venis kaj formanĝis la felon kun kalko. La viandisto ridis: „Bonan apetiton!“

Kiam la drako revenis al la rivero kaj trinkis, la viandisto aldonis: „Bonan digestadon!“

La kalko en ĝia ventro komencis ŝaŭmi, boli, murmuri. La besto muĝis, baraktis kaj subite eksilentis. La metihelpanto venis singarde al la besto kaj vidis: sur la sablo

kuŝas senmova drako kaj el ĝia krevinta ventro elfluas kalko.

Tiun tagon ĉiuj homoj ĝojis kaj senpage disdonis kukojn kaj kolbasojn. La viandisto ricevis oron kaj la drako estis pendigita en la enira koridoro de la urbodomo por eterna memoro.

Tamen estas skribite, ke en la realo la krokodilo estas donaco de la reĝo Matiaso. Do kio estas vero? Ĉu drako aŭ donacita krokodilo?